



## **La 43a Korea Kongreso de Esperanto La 98a Japana Esperanto-Kongreso**

**de la 7a ĝis la 9a de oktobro 2011,  
en la urbo Seongnam, apud Seulo, Koreio**

**paralele en la sama ejo okazos:**

### **La 30a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana kaj Korea junularoj**

- **kongresejo:** Centra Trejnado-Instituto de Korea Saemaul-Movado  
200 Yul-dong, Bundang-gu, Seongnam-Si, Gyonggi-do, 463-742 Korea; tel.  
+82-31-780-7820; fakso 82-31-780-7874
- **Kongresa Temo:** Esperanta amikeco kaj interkompreniĝo trans la maro
- **La temo de Komuna Seminario (KS):** Etaj Esperantaĵoj en nia vivo
- **Buntaj programeroj kaj fakaj kunsidoj,** ekzemple solena malfermo, interkona vespero, kongresa universitato, Amika go-kunveno, Kristano, Pasporta Servo, Azia Agado, Kiel sukcesigi junularajn eventojn, Lernolibro de moderna historio de Japanio kaj Koreio, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, Sennacieca Asocio Tutmonda, Origamio (Paperfald-ludo), Libro-horo, Korea Man-akupunktura terapio, Delegita Reto de UEA, Budhanoj, Oomoto, Kantu esperante, Lando de Esperanto, Natur-amikoj, Fakkunsido por infanoj, Meditado de Ŭonbulismo, Prezento de E.SHA Epoko, Aŭkcio, Kunsido de esperanto-rondoj, Programero por komencantoj.
- **Budojn** en Salono havos: Gunma Esperanto-Societo, Japana Esperanto-Instituto, Libroteko-Tokio, Jokohama Esperanto-Rondo, La 99a Japana Esperanto-Kongreso en Hokkaido, Korea Esperanto-Asocio

■ **Postkongresa Ekskurso** estas planata ekiri matene de la 10a de oktobro al la natura parko de montaro Soraksan kaj apudmaraj urboj Gangneung kaj Sokcho. Oni povas ĝui belajn pejzaĝojn de Goseong-gun kaj Misiryong, kaj gustumi frandaĵojn el la maro. La ekskursota kotizo por japanoj: 13 000 enoj kun unu tranokto kaj 3 manĝoj.



■ **Duontagaj ekskursoj** estas planataj sub la alloga nomo "Seula Aventuro", posttagmeze en la 9a tago, post la ferma soleno. En malgrandaj grupoj ni aventuru vesperan Seulon kaj ĉirkaŭajn lokojn. Detalon poste, kaj aliĝo surloke. Ekskursanoj bezonas iom da kroma pago, kiu kovros netan koston de la aventuro.

■ Kiel **kongresan memoraĵon**, oni eldonos kompaktan diskon de utilaj frazoj en tri lingvoj, Esperanto, japana, kaj korea. Kun ĝi estos broŝuro ankaŭ en la tri lingvoj. La memoraĵon povas ricevi ankaŭ moralaj partoprenantoj.

■ Ni havos **komunan manĝon** en la vespero de la 8a tago. La kongresanoj, kiuj pagis por kongreseja loĝejo kun manĝo, ne bezonas kroman pagon.

■ Korea grupo "KTP" kaj japana teatra trupo "Kunii-iĉiza" prezentos **folkloran teatraĵon**.

■ Ni nun planas aranĝi, ke la partoprenantoj de Komuna Kongreso povu libere ĉeesti la programerojn de Komuna Seminario, kaj ankaŭ inverse.

■ Ni rekomendas, ke maturaĝuloj loĝantaj en Japanio aliĝu tra Japana Esperanto-Instituto; ke maturaĝuloj ceteraj tra Korea Esperanto-Asocio, kaj ke junuloj malpli aĝaj ol 35 al Komuna Seminario. Pri kongresaj kotizoj kaj aliaj, turnu vin al la kontakto-adreso, kiun vi vidas sube.

※ ※ ※

■ **Kontakto-adreso japanflanka:** Sekretario de Komuna Kongreso ĉe Japana Esperanto-Instituto (JEI), JP-162-0042 Tokyo-to Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, telefono: +81-3-3203-4581, fakso: +81-3-3203-4582, retpoŝto: jek11s@jei.or.jp, TTT-paĝaro: <http://jei.or.jp/evento/2011/kk/>

■ **Kontakto-adreso koreflanka:** Korea Esperanto-Asocio (KEA), 1601 Gangbyeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-gu, Seoul-121-703, telefono: +82-2-717-6974, fakso: +82-2-717-6975; retpoŝto: kea@esperanto.or.kr, TTT-paĝaro: <http://www.esperanto.or.kr/>

■ **Kontakto-ret-adresoj de KS:**

Jung Eun-Kyung (ĉeforganizanto); unika@saluton.net Yoo Byung-Joo; dqw7743@hanmail.net Detalajn informojn vi vidas sur: <https://www.facebook.com/> komunaseminario, aŭ sur la TTT-paĝaro: <http://club.cyworld.com/kejesperanto>